# Melburna biciklado

JOANNE JOHNS (MELBURNO)



Dum longa tempo, grupo de melburnaj esperantistoj diskutis pri dutaga bicikla ekskurso laŭ la malnova fervojo inter Lilydale kaj Warburton.

Finfine ni elektis daton en oktobro, nesciante, ke ni sukcese trafus la plej malvarman, plej pluvan semajnfinon inter aro de belaj sunplenaj semajnoj.

Kvin homoj prenis parton en la aventuro, plene malsekiĝis kaj estis kovritaj per koto - sed ĉiuj ĝuis la okazon. Ni haltis duonvoje ĉe bakejo en Woori Yallock kaj daŭris tra la belega kamparo ĝis Warburton.

Tie ni kune vespermanĝis, kaj tranoktis ĉe hotelo, antaŭ ol ni revenis laŭ la sama vojo (en pli bona vetero) la sekvan tagon.

Pro la vetero ni ne renkontis multajn aliajn homojn survoje, kio pli faciligis la vojaĝon.

Freŝaj kaj plenaj de energio je la komenco



Duonvoja paŭzo por tagmanĝo ĉe bakejo



















Ĉi tiu kaj antaŭa paĝoj: Fotoj de la bela pejzaĝo survoje, la koto, la bela vido de mia hotelĉambro kaj nia vespermanĝa kunveno. Dekstre estas ekrankopio kiu montras kiom da kilometroj ni biciklis dum la du tagoj.

# Kompatinda Malkolmo

BOB FELBY (ADELAJDO)

Kun granda malĝojo mi devas raporti ke mia najbaro forpasis. Li estis ne nur bonega najbaro, sed – kaj tio multe pli gravas – li estis antaŭ ĉio ankaŭ treege bonega homo!

Oni forportis lian eluzitan korpon kaj la domo en kiu li loĝis dum tiom da jaroj restis malplena dum – mi preskaŭ estus dirinta "miloj da jaroj", sed tio ne veras. Sed la domo restis malplena plej verŝajne multajn jarojn dum la aŭtoritatoj regantaj nian vivon decidis kiu rajtas aŭ ne rajtas loĝi en tiu domo.

Por plilongigi la atendotempon de tiom multege da senhejmuloj en Aŭstralio, dum kelkaj jaroj oni faris nenion. Poste komencis veni al la domo kelkaj metiistoj por ripari, farbi ktp. Mi komencis miri ĉu iam venos iu por loĝi tie, sed eĉ mi surpriziĝis.

Subite iun belan tagon blanka aŭtomobilo haltis antaŭ la domo. Du homoj, ŝajne geedza paro, elaŭtomobiliĝis kaj iom poste ankaŭ du infanoj, knabino kaj knabo, eliris. Unue ili rigardis la straton kaj ĝiajn domojn. Tiam ili eniris la ĝardenon. La virino serĉis en sia mansako kaj trovis